

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTO ★

N-o 48, 4. sept. 1921.

Jurnalo internacia, universala, sendependa  
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

\* Eliras semajne. \*

## VI-a Nacia Kongreso de la Italaj Esperantistoj

Trento, 16-17-18. Aŭgusto 1921.

Pri la VI-a Nacia Kongreso de la Italaj Esperantistoj ni ricevis sekvantan raporton de ĉeestinto:

Grava sukceso! La unuan fojon en Trento liberigita kunvenis la Italaj esperantistoj por interŝanĝi samtempe siajn fratajn kaj samideanajn sentojn. Ĉeestis la plej konataj samideanoj de Italujo, inter ili prof. Tellini, Carolfi, Meazzini, Monti, d-ro Filippetti, adv. Vaona, Saggiori ktp. Dum la kongresaj tagoj sur la sidejo de la kongreso flirtis, vekante la intereson de la urbanoj, la verda flago.

La malferma kunsido estis dediĉita je la saluto al la kongresanoj, kiun faris la kongresa komitato pere de d-ro Mondini, kaj je la elekto de la prezidantaro, kiu rezultigis konsiston el s-oj markizo generalo Montezumolo, prof. patro Carolfi (monaĥo) kaj d-ro Filippetti, urbestro de Milano. Sendis delegitojn la reĝaj ministerioj de la militaj, de la maraj kaj de la poŝtaj aferoj, la komunumo de Trento kaj la centra oficejo de lernejoj. Telegrafan saluton sendis la prezidanto de l' konsilio de la itala registaro, Bononi.

Sammatene la kongresanoj vizitis la malliberajn, kie dum la milito mortis tragike la unua pioniro de Esperanto en Trento, adv. Peratoner.

Dum la posttagmezo s-ano Kar. Pedrolli raportis pri la Universala Kongreso en Praha; poste oni komencis diskuton pri la organizo de la itala esp. movado per ĝia centra organo, la Itala Esperanta Federacio. Ĉar oni ne venis al konkludo, la kunsido estis interrompita por fari ekskurson al la fama akropolo de „Ponte Alto“, kie okazis ankaŭ vespermanĝeto kaj kie s-o Arabeno amuzis la kongresanojn rakontante kelkajn esperantajn burleskaĵojn.

La sekvantan matenon oni daŭrigis la diskuton pri la nacia organizo, kiu finis sole dum la posttagmezo. Oni decidis, ke la Itala Esp. Federacio translokiĝos al Venezia, ke la estonta organo de la Federacio estos nur „L' Esperanto“ de S. Vito al Tagliamento, kaj ke la venonta kongreso okazos en Trieste. Patro Carolfi raportis pri „Esperanto kaj Filozofio“.

Flanke lasante pluajn detalojn, mi diros, ke la kongreso faris tre bonan impreson ankaŭ ĉe neesperantaj rondoj, kaj ke, okaze de la fina

saluto, la reprezentanto de la ministerio pri poŝtaj aferoj deklaris, ke de nun ankaŭ li estos esperantisto, ĉar, same kiel Paŭlo en Damasko, li sukcesis vidi, kvankam malfrue, la lumon de la vero.

Vespere la kongresanoj kaj aliaj invitintoj ĉeestis en teatro „Modena“, la dua teatro de la urbo, la prezentadon de „Ŝakludado“ (Una Partita a Scacchi) de Jozefo Giacosa\*) kaj de „Tie ĉi oni parolas Esperante“ de William. La aranĝo sceneja kaj kostuma (la agado okazas en 1400) estis simple mirinda. La aktoroj, ĉiuj el Rovereto, esceptite adv. Vaona el Verona, altiris al si la aplaŭdojn kaj la laŭdon de la ĉeestantoj kaj de la lokaj gazetoj. Apartan dankon oni ŝuldas al s-oj fratoj Padulli el Padova, kiuj faris bonegan tradukon, konservante eĉ la versadon kaj rimadon, de unu el la plej rimarkindaj modeloj de itala literaturo, tiel ensorĉa pro la romantikeco de la argumento kaj pro la delikateco de la sentoj kaj de la pensoj.

La 18-an la kongresanoj veturis al Rovereto, la dua urbo de Trentino, kie ili estis entuziasme akceptataj. Vizitante la urbodomon kaj la interesan muzeon, ili kunvenis en „Grand Hotel“ por la tagmanĝo. Paroladoj, burleskaĵoj kaj esperanta poezio de d-ro Dusini pasigis al kunvenintoj belegajn horojn. Post plua promenado tra la interesa kaj simpatia urbo kaj post ekskurso en la ĉirkaŭaĵojn, la gastoj forlasis la gasteman urbon promesante reveni tien kiel eble plej baldaŭ.

Okaze de la kongreso oni eldonis la esperantan tradukon de la gvidlibro de d-ro Cesare Bottisti „Il Trentino“, 277-paĝa, riĉe ilustrita broŝuro, kiun la kongresanoj ricevos senpage.

\*) La broŝureton eldonis s-ano Paolet, S. Vito al Tagliamento, Italujo. Prezo 5 lir.

### La nova estraro de F. E. I.

Okaze de la nacia kongreso de la Italaj esperantistoj en Trento ekŝiĝis la ĝisnuna estraro de la Federacio Esperantista Itala, kiu konsistis el d-ro Filippetti, urbestro de Milano, s-o A. Mandelli el Cremona kaj d-ro P. C. Monti, ĝen. sekr., kies adreso estis: Via Rossari 2, Milano. Oni elektis por la venonta jaro: adv. A. Vaona el Verona, d-ron Pizzi kaj Vianello el Venezia, Saggiori kaj

Titta el Padova; provizora adreso: Campiello della Fenice 1924, Venezia. Pluajn informojn oni dissendos baldaŭ. La Lombardia Instituto de Esperanto havas ĉiam sian sidejon en Via Rossari 2, Milano.

### Eĥo de la kongreso en Trento.

La loka klerikala ĵurnalo „Il nuovo Trentino“, kiu vidas malbonokule la esperantan movadon, skribis interalie en sia n-o 187:

„Pri tiu ĉi kongreso, kiun multaj akceptis kun kelka rideto de kompto, kiel oni akceptus kunvenon de pli-malpli mallaboremaj, senokupaj homoj, kiuj por mortigi la tempon okupas sin pri laj infanaj amuzajoj, kaj al kiuj — se ankaŭ multaj eble neas ĉiun ajn intereson — oni ne povas almenaŭ nei la lertecon por veki ian kuriozecon, ni atendos, ĝis kiam ĝiaj laboroj estos finitaj, por doni al ĝi kompletan rigardon.“

Oni notu, ke inter la kongresanoj, krom la reprezentantoj de preskaŭ ĉiuj ministerioj de la itala regno, ĉeestis ankaŭ la urbestro de Milano d-ro Filippetti kun edzino kaj filino, ĉiuj personoj „mallaboremaj, senokupaj, kiuj por mortigi la tempon okupas sin pri infanaj amuzajoj...“ Estas preskaŭ krimaj vortoj, sed la esperantistoj ne zorgas multe pri tiaj aferoj. Kaj nun mi finas dirante, ke jam kelkfoje la ĉiita gazeto montris siajn azenajn orelojn, sed tiun ĉi fojon ĝi vidigis ilin al la tuta homaro. *M. Biscaglia.*

### La Satanoj.

Kiel dokumenton ni liveras al niaj legantoj la tekston de la rezolucio unuanime akceptita je la fino de la subkongreso de la „ruĝuloj“, okazinta en Praha samtempe kun la ĝenerala kongreso. La nove fondita organizaĵo, kiu titoliĝas „Sennacieca Asocio Tutmonda“ (SAT), adreso: 25, rue Boyer, Paris 20, jam kalkulas pli ol 400 SAT-anojn. Ĝi do estas jam forto konsiderinda. La rezolucio estis prezentata de s-o E. Adam, redaktoro de „Esp. Laboristo“.

I.

Konsiderante unuaflanke,

a) ke nur per faktoj ni sukcesos veki veran intereson pri Esperanto ĉe niaj klasbatalaj organizaĵoj;

### Esperantista Akademio

Sekcio por la Komuna Vortaro.

Raporto de la Direktoro.

Altestimata Sinjoro Prezidanto!

Nur tiun ĉi jaron povis la L. K. rekomenci sian laboradon interrompitan de la dumvintaj kaj postvintaj malhelpaĵoj. Certe kun granda plezuro la esperantistaro konstato la vigecon kaj fervoron de la tiuĉiara agado de siaj lingvaj institucioj kaj la ŝatindajn jam ricevitajn rezultatojn.

Estas tre ĝojiga fakto, ke multaj L. K.-anoj partoprenis en la efektiva laboro, sed tio estas ankoraŭ pli grava kaj pli esperiga, ke, respondante al la demandoj kaj proponoj de la Sekcio por la Komuna Vortaro, ili klare pruvis per siaj respondoj kaj rimarkoj, ke, plene konsultante kun la jusa Akademia Deklaracio kaj prave atentante la danĝeron de malunueco kaj anarkio, montritan de la Akademio, ili ĝuste komprenas la nunajn bezonojn de nia afero kaj klare konscias la devojn, kiujn la kreskado de nia lingvo trudas al la lingvaj institucioj.

Jen estas la ideoj plej ofte esprimitaj aŭ aluditaj de la respondintoj:

Nepre bezona estas KOMPLETIGO de nia vortaro; sed tiu ĉi kompletigo devas fariĝi METODE, unuece kaj interkonsente, anstataŭ esti forlasata al blinda hazardo de la ĉirkonstancoj kaj al la nesingardaj kapricoj de la sensciuloj kaj nekompetentuloj.

„La tempo alvenos, eble jam alvenis“, skribas usona komitatano, „kiam la esperantistoj ne plu konsentos permesi al ĉiuj verkistoj, kleraj kaj nekleraj, bone instruitaj kaj neinstruitaj, senzorge proponi kaj uzi novajn vortojn, eĉ el radikoj intereŭropane konataj. Ĉiu devus memori, ke la inter-

naĉa lingvo estas por la homoj de la tuta mondo, kaj se unu kaj alia homo povas gaje fari ĉiujn ajn aldonojn kaj ŝanĝojn sen antaŭa konsultado kun la L. K. aŭ Akademio, Esperanto baldaŭ disfalos same, kiel disfalus la angla aŭ franca aŭ iu ajn alia nacia lingvo sub tia traktado.“

Efektive, samaj kaŭzoj ĉiam estigas samajn efikojn: La libera natura senkonscia kaj senscia evoluado de la naciaj lingvoj, kiu igis ilin ĉiujn malsimplaj, mallogikaj, malregulaj, kapricaj kaj esceptoplenaj, baldaŭ kondukis ilin al pereiga disfalo en diversajn lokajn dialektojn kaj apartajn korporaciajn jargonojn, se la unuecon kaj komunan kompreneblecon de la lingvo ne defendus kaj konservus potencaj konsciaj konservaj fortoj, tio estas la libraj verkantoj, la instruistoj, la lingvaj, literaturaj kaj sciencaj institucioj kaj la ŝtataj administracioj.

Ĉar la unueco de Esperanto ankoraŭ ne povas esti subtenata de la instruistoj nek protektata de la ŝtato; ĉar, aliflanke, pro la diversnacieco kaj diverslingvaneco de la esperantistaj aŭtoroj kaj vortaristoj, niaj libroj kaj vortaroj, respegulante la diferencajn lingvajn, pensajn kaj sentajn kutimojn de la verkantoj, anstataŭ esti, kiel en la naciaj lingvoj, unuigilo kaj konservilo, plej ofte estigas kontraŭe diversecon kaj malunuecon, pro tio la esperantistaj lingvaj institucioj, almenaŭ ĝis la tempo, kiam ĉiu aŭtoro konsentos trudi al si mem volan konscian severan disciplinon, estas kaj estos la sola konserva kaj unuiga forto, kiu povas kontraŭbatali la dividajn pereigajn fortojn. „Oni povas troigi la respekton al la libera natura vivado“, asertas sveda Akademiano.

Kaj ĉiuj same konkludas: Ni nepre bezonas regulojn kaj gvidilojn; la propra kaj deva rolo de la lingvaj institucioj estas faciligi, reguligi kaj internaciigi, tio estas unuformigi, la evoluadon

de la lingvo. Vera libereco ne estas senbrida, senpripensa kaj senkontrola kaprico, sed estas konscia, prudenta, laŭregula, metoda elekto. La esperantistaro bezonas konstantan kaj efikan helpon por la laŭnorma pliriĉigo de la lingvo kaj precizajn konsilojn por la malfacila elekto de la novaj radikoj kaj formoj. Nur la lingvaj institucioj, en la nuna stato de nia afero, povas plenumi tiun taskon, nur ili povas sciligi la esperantistojn kaj precipe la verkantojn pri la internacieco aŭ ne-internacieco de la radikoj, nur ili povas admoni kaj konsili pri la taŭgeco aŭ netaŭgeco, utileco aŭ neutileco de la proponebloj. Estas pli saĝe antaŭforigi la malsanon ol nesingarde atendi ĝin kaj nur klopodi por kuraci ĝin, kiam ĝi ekzistas, enradikiĝis kaj graviĝis. Estas pli facile kaj pli certe detruiri en la nesto la ovojn de malutila birdo ol tro' malfrue vane persekuti la fortiĝintajn forflugantajn birdojn, t. e. la jam presitajn malbonaĵojn.

„Mi tre bedaŭras“, diras sprite iu komitatano, „ke la L. K. kaj Akademio fermas la pordon nur post kiam la ŝtelisto jam ŝtelis la ĉevalon el la ĉevalejo.“ „Oni troigas“, skribas germana respondanto, „la regulon, ke la Akademio kaj la L. K. ne rajtas fari proprajn proponojn. Kial do ne admoni la esperantistaron kontraŭ la malbonaj formoj?“ „Ni mankas je direktantaj principoj kaj reguloj en la elektado de novaj radikoj“, diras franca komitatano, kaj alia samnacieco aldonas: „La Direktanta Organo de la Lingvo Internacia devus proponi al la L. K.-anoj kaj al la aŭtoroj la radikojn, kiujn ĝi opinias la plej konsilindaj por pleniĝi la mankojn de nia vortaro.“

Mi petas la permeson rememorigi, ke la Akademia Sekcio por la Komuna Vortaro, antaŭe konsentante kun tiuj ĉi admonoj kaj postuloj, jam oficiale konsilis kelkajn principojn por unuformigo

- b) ke la sperta jam montris, ke UEA estas la sola organizaĵo, kiu en la praktiko montrigis fruktodona;
- c) sed ke ĝia politika neŭtraleco malpermesas, ke ĝi povu efike labori sur nia proletaria kampo.

## II.

Konsiderante duaflanke,

- a) ke la ĉefa tasko de nia Asocio povas neniel esti politika, ĉar jam ekzistas klasbatalaj organizaĵoj;
- b) ke samkiel antaŭ 20 aŭ 30 jaroj estis nepre necesa, ke ĉiuj praktikantoj de Esperanto — ĉu pastroj, ĉu anarkistoj, ĉu policanoj — arĝu por montri per faktoj, ke artefarita lingvo povas esti uzata en la praktiko, estas nun necese, ke ĉiuj esperantistoj, anoj de diversaj klasbatalaj organizaĵoj arĝu en unu solan asocion por montri al la proletario per imponaj faktoj, kiom utiliga Esperanto estas por la batalo kontraŭ la kapitalista sistemo.

## III.

Konsiderante triaflanke.

- a) ke la kunlaborado kun la t.n. burĝaj esperantistoj povus per tia kompromiso nur malutili al nia propagando;
- b) ke jam multaj faktoj montras klare, ke niaj klasaj kontraŭuloj tute ne deziras, ke Esperanto disvastiĝu en niaj proletariaj rondoj.

Pro la ĉi-supre diritaj motivoj la I-a Kongreso de SAT:

Konfesas, ke oni devas profiti je la sperto jam farita ĉe la neŭtrala asocio UEA;

Deklaras, ke nur je teknika vidpunkto nia Asocio povas kontakti kun la aliaj esperantaj asocioj;

Petegas ĉiujn klaskonsciajn batalantojn, ke ili dediĉu sian tutan energion al la kreskado de la unua klasbatala esperantista Asocio tutmonda;

Sendas al ĉiuj esperantistaj proletarioj sian elkoran saluton kaj petas, ke ili aniĝu la Asocion, por ke per komuna, frata kaj sindonema kunlaborado ni metu kiel eble plej rapide en la manojn de ĉiuj proletarioj la ilon, kiu permesos al ili la forrenversiĝon de la lingvaj baroj.

Por la hipokritan neŭtralismon, for la kapitalismon, vivu SAT!

# Esperanto kaj la scienco en Praha.

(Represo permesata)

La 2-a de julio de 1921, ĉe la 13-a Kongreso Esperantista la 2-an de aŭgusto rekomendas, ke estu restarigotaj Internacia Sciencia Asocio kaj Internacia Sciencia Revuo kun jena programo:

1. sciencia propagando,
2. statistiko pri la sciencia esperanta literaturo,
3. terminologio internacia kaj esperanta,
4. demando kaj petejo pri reciproka helpo en sciencia laboro.

Por efektiviĝi tion, estis elektata jena komitato, kiu havos rajton per sia voĉdonado akcepti novajn membrojn ĝis nombro 25:

- |                           |                  |
|---------------------------|------------------|
| prof. Alessio, Torino     | por Itallando    |
| prof. Cart, Paris         | por Franclando   |
| d-ro Döhler, Riesa        | por Germanlando  |
| prof. Kamaryt, Bratislava | por Ĉeĥoslovakio |
| prof. Kohout, Praha       | por Ĉeĥoslovakio |
| ing. Pratley, Montreal    | por Kanado       |
| s-o Setälä, Helsinki      | por Finnlando    |
| d-ro Sieche, Leipzig      | por Germanlando  |
| s-o Stettler, Bern        | por Svislando.   |

La subskribinto entreprenis gvidi la propagandon kaj la aranĝajn laborojn. Ĉar oni interkonsentis, ke eldonado de la revuo nur estas ebla, kiam oni ricevos antaŭe la subskribojn de minimume 500 abonantoj, la sekretario jam dum la kongreso kolektis abonpromesojn sub jena formo: La subskribintoj promesas aliĝi al Sciencia Asocio aŭ al Sciencia Revuo aŭ al ambaŭ, sub la kondiĉo, ke la maksimuma prezo estu la sama kiel tiu de UEA por abonanto, membro-abonanto aŭ membro simpla en la jaro 1921 je la samaj kurzoj. Li sukcesis akiri dum la kongreso 50 abonpromesojn el 17 diversaj landoj kaj krom tio kolektis la subskribojn al libervolaj mondonacoj por la aranĝaj laboroj je sumo de pli ol 1000 germ. marko.

La sekretario nun intencas intertrakti kun diversaj aliaj komitatanoj proponitaj jam, kiuj ne povis esti demandataj pro neĉeesto, poste eldoni klarigan propagandan flugfolion pri la projektotaj institucioj kaj kolekti abonpromesojn kaj mondonacojn libervolajn. Li jam intertraktas kun la lamaj estroj de Int. Sciencaj Asocioj kaj Sciencia Gazeto kaj kun la gvidantoj de la kuracistoj (T. E. K. A.) instruistoj kaj inĝenieroj, por ke la terminologia afero estu interscience organizata.

Ĉiuj, kiuj jam nun volas subteni la aferon, estas kore petataj sendi sian aliĝon kaj abonpromeson al la subskribinto. Ĉar la propagando kostas multan monon, ni tre dankeme akceptas mondonacojn, kies kvitanco estos publikigata en la revuo de la Sciencia Asocio. La eksterlandanoj sendu sian aliĝon en propraj ŝtataj notoj en germana litero al la subskribinto. La germanoj sendu ĝin aŭ per „Giro“ al „Esperanta Sciencia Oficejo, Stadtgiro Riesa Nr. 1503, aŭ per poŝtĉeko al „Postcheckkonto Nr. 24387 en Leipzig, der Sparkasse Riesa für Girokonto 1503“.

La tuta mono estos kolektata en la citita „Giro“-konto malfermita nur por la celoj de la novstarigo de Int. Sciencia Asocio kaj Sciencia Revuo; kiel kontrolantoj jam estas petitaj s-o prof. d-ro Kamaryt kaj Setälä.

Ĉian helpon kaj subtenon petas

D-ro Walter Döhler,  
Goethestrasse 55, Riesa, Sakslando,  
Germanlando.

de la metodo sekva en la elekto de novaj vortoj (Vidu: Ofic. Gaz., 25. majo 1921; Oficialaj Komunikoj), kaj ĝi intencas proponi al la Akademio publikigi, laŭ la deziro de la L. K., liston de preferindaj aŭ rekomendindaj radikoj. Oni povas esperi, ke tiuj ĉi rekomenditaj formoj kaj radikoj, eĉ se ili ne estas ĝis nun uzitaj, baldaŭ eniĝos en la uzadon tiamaniere, ke la L. K. rajtos pli poste oficialigi ilin kaj eĉ en la propran esperantlingvan vortaron.

Fine la Komunvortara Sekcio intencas peti de la Akademio, ke ĝi denove proponu al pli detala ekzameno kaj pli funda esploro de la L. K. kelkajn radikojn, kies signifo ne estas sufiĉe precize kaj plenakorde fiksita, kvankam ili estas oficiale akceptitaj. Mi citas ekzemple la radikojn „administraci“, akcesor“, binokl“, blok“, emfaz“, flagr“, konfekci“, ŝose“, verv“, ktp.“

Certe multa laboro restas farota, kaj la tasko de la Akademia Sekcio por la Komuna Vortaro estas malfacila kaj multpena, sed tiu ĉi tasko estos multe faciligata kaj helpata per la evidenta bonvolo, per la kuragiĝa aprobo kaj per la ĉiukonsenta apogo de la L. K. Tia konsento kaj aprobo estigos sen la dubo tre favorajn rezultatojn por la sukceso kaj prospereco de nia afero.

Ni nun parolu pri la jam farita kaj pri la jam komencita laboro:

1. Per sia unua cirkulero la Akademio demandis al la L. K. ĝian opinion pri la litero H kaj pri la duontehnika sufikso OJD aŭ OJD. Pri ambaŭ demandoj, precipe pri la unua, mi ricevis tre interesajn rimarkojn, kiujn mi bedaŭras, ke mi ne povas citi tie ĉi. La plimulto de la respondintoj preferas la formon OJD kaj aprobas la laŭvolan anstataŭigon de la litero H per la litero K en la okazoj, kiam ĝi senpere sekvas post la litero R.

2. Al la alvoko de la Komunvortara Direktoro, proponanta internacian esploron pri Proverboj,

Komparoj ktp., sufiĉe multaj kompetentaj kaj penemaj esperantistoj jam favore respondis. Kelkaj fruktodonaĵoj estas prezentitaj, la plano de la laboro kaj la metodo por la esploro precizigis, kaj oni povas esperi, ke diversaj naciaj subkomisionoj, direktataj de kompetentuloj, eĉ de eminentuloj, estos baldaŭ definitive organizataj kaj komencos la proponitan esploron. Nederlanda komitatano jam sendis tre gravan kaj admirindan preparan laboron pri la holandaj proverboj. Al ĉiuj miaj sindonaj kunlaborantoj mi sendas mian koran dankon.

3. Fine mi povas sciigi, ke la proponita prepara listo por la 3-a Aldono estas akceptita en sia tuteco de granda plimulto de la L. K.-anoj.

Tamen multaj el niaj kolegoj, eĉ akceptante la tutan liston, aldonas tre atentindajn rimarkojn kaj ĝustajn kritikojn koncerne la vortojn kun la pseŭdosufiksoj ACIO, ICIO, UCIO, kaj la verban finiĝon II. Pro klare montritaj motivoj ili principe firme malaprobis la radikojn „apelaci“, arbitraci“, civilizaci“, deklaraci“, erudici“, evoluci“, kontribuci“, konversaci“, navigaci“, revelaci“, revizi“, reziĝnaci“, spekulaci“, sugesti“, ktp.“, preferante la pli simplajn formojn „apel“, aŭ „apelac“, arbitrac“, civiliz“, deklar“, erudit“, evolu“, kontribu“, konvers“, navig“, revel“, reviz“, reziĝnac“, spekul“, sugest“, ktp.“

Esceptante nur kelkajn apartajn radikojn aŭ formojn, kiuj eble estas konservindaj pro diversaj motivoj montritaj en la noto de la 30-a de junio, komunikita de la Prezidanto al ĉiuj L. K.-anoj, la Direktanto de la Akademia Sekcio por la Komuna Vortaro plene samopinias, kiel la supredirita L. K.-anoj, kaj li esperas, ke liaj atestimataj kolegoj aprobos la jenajn konsiderojn kaj la rimedon, kiun li proponas por kontentigi kaj konsentigi ĉiujn:

Ni ne lasu nin trompi per la vorto „oficiala“. Ĝi ne signifas, ke ĉiu oficiala vorto estas propre

# Postsonoj de la XII-a.

La sveda karavana vojaĝo.

Samideanoj aŭdintaj, ke multaj svedaj partoprenintoj en la kongreso en Praha ne sciis paroli nian lingvon, eble miris pri tio, kaj al ili eble ŝajnis, ke la svedaj esperantistoj estas indiferecentaj kaj neinteligentaj homoj eĉ ne lernintaj Esperanton.

Unue legu ĉi subajn liniojn, poste juĝu.

Ni invitis al komuna vojaĝo al Berlino, Dresden, Praha kaj Wien ĉiujn, kiuj volis veni kun ni. Ni anoncis, ke ne estis devige antaŭe lerni Esperanton, ni tamen konsilis al ili tion fari. Pro specialaj kaŭzoj la partoprenintoj devis aliĝi al nia federacio kaj al la kongreso. Ni faris dum la prepara tempo nenion por altrudi al ili Esperanton, sed diris inter ni: „Se la vojaĝantoj ne pli frue fariĝos esperantistoj, tio certe okazos dum la vojaĝo inter Dresden kaj Praha.“

La nombro de partoprenintoj estis pli granda ol ni iam esperis, eĉ pli granda ol ni deziris. Entute sin anoncis 91 personoj, el kiuj 23 jam sciis Esperanton, la aliaj ne.

Niaj esperoj pri la bona efiko de la vojaĝo plenumiĝis antaŭ nia alveno al Dresden. Jam en Berlino la plej multaj komprenis la gravecon kaj la grandan mision de Esperanto, en Dresden ilia intereso pligrandiĝis kaj en Praha multaj el la svedaj fraŭlinoj, kiuj ne sciis nian lingvon, decidis pri renkontoj proksiman kongreson, kompreneble kun la promeso, ke ili tiam parolos esperante. Ankaŭ ili interkonsentis pri korespondado kun diverslandanoj.

Dum la daŭrigo de la vojaĝo la intereso por nia lingvo fariĝis pli kaj pli granda. Ni gvidantoj estis fieraj, povi montri al la antaŭaj dubantoj, ke tamen ekzistas esperantistoj kaj ke oni jam nun havas utilon praktikan de nia lingvo.

Ĉiuj 66 partoprenintoj en nia vojaĝo, kiuj ne antaŭe estis konvinkitaj pri nia afero, reventis kiel entuziasmaj samideanoj. Sed tio ne estis la tuta rezultato. Ili kompreneble kun fiereco rakontos buŝe kaj skribe al siaj konatuloj pri la agrabla vojaĝo, kaj la famo de Esperanto disvastiĝos tra nia tuta lando. Proksiman jaron, se ni tiam aranĝos similan propagandan vojaĝon, ni certe ricevos multfoje pli la partoprenantojn.

Ni ŝuldas al ĉiuj eksterlandaj samideanoj, kiujn ni renkontis dum nia vojaĝo, grandan dankon pro iliaj afableco kaj helpemo. Ili memoru, ke ili faris ne nur al la svedaj vojaĝantoj sed al nia tuta esp. movado valoran servon.

Ni kredas, ke tiu ĉi propaganda vojaĝo estis, almenaŭ por la svedaj rilatoj, plej bona propagandmaniero. Unue montru, kio estas Esperanto, kaj poste faru el la homoj esperantistojn!

Kaj Vi, eksterlandaj samideanoj, kiuj donis kaj prenis promesojn pri korespondado kun niaj svedaj tialoj kaj ankaŭ fraŭloj, ne forgesu la promesojn ambaŭflankajn.

Henning Halldor.

## Mallongaj Esp. Sciigoj.

Antaŭ- kaj postkongresaj kunvenoj en Frankfurto a. M.

La Esperanto-Kartelo Frankfurt aranĝis 3 sukcesplenajn kunvenojn. En la kunveno de la 27-a de julio, vizita de areo de fremdlandaj gastoj, afable parolis s-o d-ro Privat el Genevo, s-o Gill North, same itala, holandaj kaj francaj samideanoj. La 29-an de julio s-o Faulhaber, Amsterdam, faris esp. paroladon pri Framasonio, precipe

esperantlingva kaj povas esti ĉiokaze uzata. Oni ne devas forgesi, ke nia „OFICIALA“ vortaro efektive konsistas el du malsamaj partoj:

1. la PROPRAJ esperantlingvaj radikoj;
2. multaj ĝenerale (aŭ, pli ĝuste, eŭropane) internaciaj radikoj, kiuj, ne apartenante propre al nia lingvo, restas FREMDAJ vortoj kaj, laŭ la 15-a Fundamenta regulo, nur „povas esti uzataj“ de la esperantistoj. Preskaŭ ĉiuj radikoj kun pseŭdosufiksoj estas FREMDAJ internaciaj vortoj, kiuj, eĉ oficialigitaj, tamen ne estas asimilitaj kaj alproprigitaj al la esperantlingva vortrezoro. „Oni devas diferencigi“, skribas tre prave la germana komitatano, „inter vortoj plenrajte ENKONDUKINDAJ kaj vortoj TOLERINDAJ.“

Angla Akademiano rimarkigas, ke ĝenerale la INTERNACIAJ vortoj estas internaciaj pli laŭ formo ol laŭ signifo. Tiu ĉi simpla sed tre grava rimarko pravigas la oficialigon de la internaciaj vortoj, kiun kelkaj rigardas kiel danganon aŭ almenaŭ senutilan: la oficialigo de tiaj vortoj servas por fiksi kaj internaciigi ilian SIGNIFON.

Jam en la 2-a Oficiala Aldono prof. Cart kaj liaj tiamaj kunlaborantoj tre prave dividis la oficiale aprobitajn radikojn en du listojn proksimume korespondantajn al la supre montritaj. La radikoj de la 1-a Oficiala Aldono estos sammaniere du-partigitaj en la baldaŭ publikigota Akademia Plena Radikaro anoncita en mia 1-a cirkulero, kaj estas tre dezirinde, ke tia du-partigo estu poste klare montrata en ĉiuj estontaj vortaroj.

Multaj L. K.-anoj postulas, ke oni senbalastigu kaj kribru nian vortaron. Ni ĝuste povas profiti la okazon por kontentigi tiun tute pravon peton, ĉar la supre aludita du-partigo estas la plej bona kaj taŭga rimedo por efektiviĝi la deziratan kaj dezirindan senbalastigon.

E. Grosjean-Maupin  
Direktoro de la Akademia Sekcio  
por la Komuna Vortaro.





**VORLAUFIGES AUSSTELLER-VERZEICHNIS** (Provizora nomaro de la ekspozantoj) de la aŭtuna foiro de Frankfurto (28. sept. — 1. okt.) ĵus aperis. La kajero enhavas la nomojn de la ekspozantaj firmoj aliflanke ĝis 1. aŭg., ordigitajn laŭbranĉo kaj laŭalfabete. Antaŭparolo en germana, angla kaj franca lingvoj. La 96-paĝa kajero, disvastigita en 150000 ekzempleroj certe estas bona propagandilo por la foiro de Frankfurto.

**MORAVIA KARSTO.** Abismo Macoĥa kaj grotaj. Laŭ prof. d-ro K. Absolon trad. J. Blahoslav Havebla ĉe Esp. Klubo en Brno, Falkensteinerstr. 14. Formato 17:13 cm. 44 paĝoj. Prezo 1.50 fr. fk.

Certe ankaŭ la samideanoj ne partoprenintaj en la kongreso de Praha aŭ ne vidintaj la mirigajn grotajn de subtera rivero Punkva plezure informiĝos pri tiuj grandiozaj mondmirakloj, kiuj estas prezentataj en tiu ĉi libreto laŭ vere arta kaj plaĉa maniero. La teksto, priskribanta detale la grotajn labirintojn de Moravia Karsto kaj speciale tiun de Macoĥa kaj Punkva, estas ilustrita per 8 tupaĝaj bildoj pri la plej admirindaj stalagmitoj kaj stalaktitoj. Je la fino de la libreto estas plano de la subtera vojo tra la grotaj de rivero Punkva al abismo Macoĥa.

Pri la lingvo mi devas diri, ke ĝi estas komprenebla, kvankam mi trovis kelkajn preterparojn, ankaŭ novajn vortojn kaj strangaĵojn. (R-ano.)

#### GAZETOJ.

**VERDA UTOPIO.** Junio.

Kun ilustraĵo: Virino, lavanta vestaĵojn.

**LA VERDA OMBRO.** Junio.

**VEGETARANO.** Julio.

Adreso: Hamburg-Fuhlsbüttel (Germ.), Alsterkrug chaussee 586.

**LA XIII-A.** Oficiala organo de la Loka Kongresa Komitato. Aperas monate ĝis fino de 1921. Abono por 5 n-oj 7,50 Kč., eksterlande 2 fr. fk. Adreso: Praha III, Nerudova 40.

Kun poemoj kaj artikoloj rilatantaj al la kongreso de Praha. La sekvontaj n-oj enhavos dokumentojn, scigojn kaj bildojn, koncernantajn la XIII-an, tiel ke la gazeto fariĝos interesa memoraĵo por ĉiuj. Kompletita adresaro de la kongresanoj troviĝos en la lasta n-o. Kiel aldono aperados teksto de la kongresa teatraĵo „Nokto en Karluv Tyn“.

**LA FRANCE POSTALE ESPERANTISTE.** Trimonata organo de la esp. poŝtistoj en Francio. N-o 1, julio 1921. Redakcio: M. Michells di Rienzi, 20 avenue Reille, Paris 14.

### Anoncetoj.

**DANKO.** Al Mexin kore dankas ĉiujn, kiuj sendis al ŝi rakontojn el sia lando. Se li deziras ricevi la libron „Unuaj Paŝoj“, li skribu al ŝi sian adreson. — Al Mexin, del. UEA, Montreux, Svis., 68 Grand'Rue.

**FILATELISTOJ.** En Kovno (Litovio) fondiĝis nova filatelista societo: „La verda stelo“. La celo de tiu nova societo estas ebligi al ĉiuj membroj la interŝanĝon de ĉiusepecaj objektoj, kiel poŝtmarkoj, poŝtkartoj, bildoj, papermonoj ktp. Se vi deziras aliĝi, bonvolu sendi vian adreson kaj jarkotizaĵon (20 germ. mk.) laŭ la adreso: Kovno, Litovio, Kleistučio n-o 87, al s-o Leono Girgu.

**MALNOVA NUMERO DE ET.** S-o A. B. Durocher, 297, Workman Street, Montreal, Kanadio, deziras aĉeti n-on 2 de ET. Klom vi postulas?

**LEDA INDUSTRIO.** Franca gazeto de leda industrio „Le Cuir“ (La Ledo) dezirante enkonduki en sia eksperto eldoni: „La Indekso de ledaj industrioj“ fakon en Esperanto, petas ĉiujn esperantistojn interesigantajn pri la leda komerco aŭ industrio, kiel teknikistojn, komercistojn aŭ oficistojn, sendi sian adreson kun indiko de la profesio al s-o ĉefredaktoro de „Le Cuir“, 54 rue de Bondy, Paris 10.

**FOTOJ DE LA DEKTRIA.** Esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne havas la fotografaĵojn de la XIII-a Kongreso en Praha, povas ilin ricevi en jenaj specoj: 1. Malferma kunsido en poŝtkarta formato 3 Kč., en pli granda formato 12 Kč., 2. Grupo de fremduloj 12 Kč., 3. Granda grupo de kongresanoj (ĉe la preĝejo) 12 Kč., malpli granda 7 Kč. Jan B. Vlach, Praha I, Narodni 38.

**MEMIO.** S-o Nikola Nedeltcheff, studento, Wienerstr. 60, Darmstadt, Germ., serĉas hemlatajn gekorespondantojn. Interŝanĝas bonvolente kun gesamideanoj ilustritajn poŝtkartojn.

**KONGRES-FOTOGRAFAĴOJ.** Bone sukcesintaj dummomentaj fotografaĵoj okaze de la inaŭgurado de memorotabulo dum la vizito de la esp. kongresanoj en Karlsbad la 9-an de aŭgusto estas riceveblaj de fotografo Anton Schmolz en Karlsbad, domo „Typographia“. Prezo 4 ĉsl. kr., 6 ekzempleroj 20 kr., 12 ekz. 40 kr., plus sendkostoj.

**FERVOJISTOJ.** O.-G.-V. Ernst Muthschall, Forest i. L. (Germ.), Gubenerstr. 28, sendas 7 belegajn poŝtkartojn ilustr. („Tuck“, pri Halle) kaj 1 fotografaĵon (submarboato „U 19“) kontraŭ alsendo de fervojaj fakgazetoj (fr., a., ital., nederl., hisp.), regularoj, poŝtk. ktp.

#### Korespondo kaj Interŝanĝo.

Otto Charvat, fervoja oficisto, interŝanĝas poŝtkartojn ilustritajn (bildf.) kun ĉiuj landoj. Adreso: Trnava, stacidomo-nadraŝi, Ĉeĥoslovakio.

Hungario, Miskolc, Szemere 27, s-o Lichtmann Nandor, studento, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Termezuristo deziras korespondi kun allandaj samfakanoj pri la demandoj de sia profesio, kun aliaj pri diversaj ideoj. Liudas Aiseika, Ŝiauliai, Pasadna 19, Litovio.

F-ino Bronė Zemackaitė, Ŝiauliai, Zemes Ukio Skirtus, Litovio, interŝanĝas per poŝtkartoj ilustritaj (bildf.)

S-o Kazis Juozapavičius, 15-jara gimnaziano, korespondas per poŝtkartoj ilustritaj (bildf.). Adreso per Liudas Aiseika, Ŝiauliai, Pasadna 19, Litovio.

Mi deziras ricevi detalajn scigojn pri ĉiuj ekzistantaj terkulturaj kolonioj, moralaj kaj religiaj komunumoj, kiuj celas helpi al morala kaj materiala bonstato de l' homo. Scigoj estas dezirataj el la tuta mondo. Adreso: B. Duda, litovulo, Subačius, Makavvėciu Sodz.

Gutman Gittel, Jonava, Senojn g 24, Litovio, deziras korespondi per poŝtkartoj, poŝtkartoj ilustr., poŝtmarkoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

S-o Johannes Tamverk, Karla 5. Haapaalu, Estonio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj (bildf.) nur kun fraŭlinoj.

S-o J. Lähiharju, ad. Mieto, Polvi, Finnlando, deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj.

S-ino Hilja Valve, Kausala, Radonsuu, Finnlando, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, ilustr. poŝtkartojn de vidindaĵoj kaj pejzaĝoj.

Manuelo Palomera, Cardenal Casanas 10, Barcelona, Hispanujo, deziras korespondi per poŝtkartoj aŭ leteroj kun la tuta mondo.

S-o Capton, 48 rue Vaneau, Paris, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn.

Nikolao Ivanov, 110 Puškina-kaja, Barnaul, Siberio, deziras korespondi per poŝtkartoj, poŝtkartoj ilustr., leteroj, interŝanĝi poŝtmarkojn kaj esperantaĵojn. Temoj: Nacia vivo, muziko kaj progreso de Esperanto.

C. Fulima, ĉe Bogahuro, 95, Genbel, Pocuka, Tokio Fu, Japanio, deziras korespondadi kun ĉiuj landoj.



# 7a Internacia Foiro de Breslau

Aŭtuna Foiro

4-a ĝis 8-a de Septembro 1921.



Teksajoj, ledajoj, ŝuoj, ornamajoj kaj artmetiaj objektoj, meblaro, pormaŝtrud-artikloj, sportbezonaĵaro, papero kaj paperajoj, kontor-uzaraĵo, manĝaĵoj kaj ĝuaĵoj, kemiaj- . . . . . teknikaj artikloj. . . . .

Informojn donas:

## Breslauer Messe-Gesellschaft m. b. H.

ESPERANTO-FAKO

BRESLAU I (Germ.), Ohlauerstr. 87.

Ĵus aperis:

### Katalogo pri Pola Esp. Literaturo kaj Esperantaĵoj

montranta majstre tradukitajn verkojn aŭ originalaĵojn de niaj eminentuloj L. Zamenhof, Grabowski, Belmont, Kabe, Kuhl k. a., riceveblaj ĉe P. E. S.

Tuj postulu la katalogon! Vi ricevos ĝin senpage.

Por sendkostoj aldonu 1 internacian stampitan resp.-kup. aŭ koncernen kvanton da ŝtataj poŝtmarkoj nestampitaj, aŭ naciaj monon.

Adreso:

### Pola Esp. Servo (P. E. S.)

s-o Fr. Prengel, Bydgoszcz (Polio), Kordeckiego 1 a.

Atentu la novan adreson!

Novajo:

### BONHUMORAJ RAKONTOJ

el hungara literaturo.

Samgranda kiel „Ses Noveloj“.

Rekomendita de E. L. A.

Ricevebla kontraŭ sendo de 3 germ. mk., 3 ĉ. kr., 0,50 fk. ktp. ĉe

P. Balkanyi, Budapest VI, Hajos ut. 15-II-2.



Mendu tuj pli multajn ekzemplerojn!

### L' Esperanto

Monata ilustrita internacia revuo sub patronado de Itala Katedro de Esperanto.

Abono: 15 lirojn (8 francajn fr.)

(per poŝtmandato, ĉeko, respondkuponoj, aŭ en kiu ajn nacia mono, en rekomendita letero).

Direkcio:

A. Paolet, S. Vito al Tagliamento (Italujo).

Konstantaj rubrikoj de la Revuo dum 1921 (ĉiuj en E.):

Ĉefa artikolo. Gramatiko de Friula Lingvo. Esperanta Sinonimaro. Kiel oni fariĝas grafologoj? Rimoj kaj Versoj. Noveloj kaj Rakontoj. „Itala Animo“, diligenta tradukaĵo de verko de klasikaj italaj aŭtoroj. Revuo de la Revuoj, interesplena rubriko, kiu per klaraj resumoj kolektas la plej notindajn sciindaĵojn aperintajn en la ĉefaj E. gazetoj de la mondo pri la plej diversaj temoj. „De Alpoj al la maro“, priskriboj de la urboj kaj de l' mirindaĵoj de Italujo. Esperantaj sciigoj. Recenzoj, korespondado, humoraĵoj ktp.

Vi pri l' Lando Matensuna, Pri l' Popol' en Tempo nuna Kaj antikva volas koni? Nu rapidu tuj aboni —

la Revuon

### VERDA UTOPIO

monata, ilustrata.

La sola en ekstrema Oriento politika, socia kaj literatura revuo.

Redaktata nur en Esperanto.

Jarabono: Yen 1.70, Helpabono: Yen 5.00.

Redakcio kaj Administracio:

5265, Uehommachi 7-chome, Minamiku Osaka, Japanujo.

Abonu al Anoncu en **ET!**

Ĉar ni sukcesis fari interkonsenton kun unu el la plej konataj paperfabrikoj en Finnlando, ni havas okazon proponi al eksterlandaj papervendejoj, pomalgrande kaj pogrando, diversajn

### Poŝtpaperojn kaj Kovertojn

Je la prezo de la fabriko. Provkolekton (ĉirkaŭ 100 specialaj poŝtpaperoj kaj kovertoj) ni tuj sendos al vi kontraŭ M. 20.— aŭ Fmk. 16.—. Petu specimenojn kaj kondiĉojn, faru provmendojn kaj vi certe estos kontentaj.

O./Y. MOVADO A./B.  
Helsinki, Kasarmink. 20, Finnlando.

### Komerce-teknika domo M. Kutaszek, Varsovio (Pol.) Nowy Swiat n-o 26

serĉas reprezentadon aŭ „per cassa“ de maŝinoj por refari (prilabori) la lignon kaj metalon, krom tio ĝi serĉas reprezentadon de ŝtalo, motoroj, armataroj por gaso, akvo kaj aliaj teknikaj artikloj.

Vendado pogranda. Bonaj referencoj. Nur seriozaj firmoj, volantaj vendi siajn artiklojn en nia lando, estas petataj respondi.

### La lastaj Tagoj de D-ro L. L. Zamenhof.

Ĉiu esperantisto devas posedi tiun ĉi libron. Prezo 15 germ. mk. ĉe la eldonejo de „Esperanto Triumfonta“ en Köln-Horrem.

### Poloj

mendu ĝin ĉe societo „Konkordo“, Varsovio (sekr. f-ino d-ro Muszkatblat, Krochmalna 15) aŭ ĉe Pola Esp. Societo (s-o Karolczyk, Vidok 19).